## MÓR JÓKAI

1825—1904. (Pron.: mór jókai).

*Unu el la plej grandaj fabelistoj de l' mondliteraturo. Lia oriente riĉa fantazio estas neelĉerpeble abunda. Liaj verkoj ampleksas pli ol 100 volumojn. Lia kreanta genio manifestiĝas ne nur en lia milflanka fabeloplekto, sed ankaŭ en lia sorĉiste facila, mirinde klara kaj sonora stilo.*

## KIUN EL LA SEP.

Kuisto malriĉa vivis iam en ĉi tiu granda urbo Budapest, kiu neniel povis riĉiĝi per sia metio. Ne, ĉar la homoj eble komplotis, ke ili ne portos plu botojn, nek, ĉar la magistrato eble ordonis, ke de nun oni devas vendi la botojn por duona prezo; kaj la kompatindulo ja laboris tre bone, mem la aĉetintoj plendis, ke ili ne povas disŝiri la botojn, kiujn li faras; kaj li havis ja sufiĉe da mendantoj; kaj ili ja pagis honeste, neniu el ili forkuris kun nepagita kvitanco — majstro Johano tamen ne povis veni sur verdan branĉon, kiel oni diras germane, eĉ ne malofte li estis jam proksima al tiu stato, kiam kiel ajn sekan branĉon oni trovas bona kaj konvena por malsuprenrigardadi de ĝi. — Sed komprenebIe tio estis nur malplena parolo, ĉar majstro Johano estis vera kristano kaj kristana homo ne pendigas sin, kiel ajn premanta estas lia stato.

Do, por diri la kialon, tial ne povis akiri majstro Johano havon kaj riĉon, ĉar aliflanke Dio benis lin tiel senmezure, ke ĉiun jaron regule naskiĝis al li infano, jen filo, jen filino kaj ĉiuj estis sanaj kiel la fero.

— Ho Sinjoro, mia Dio! — ĝemspiris majstro Johano ĉe ĉiu nova numero: kiam venis la sesa, la sepa, la oka; — kiam venos la punkto post ĉi tiu longa linio? Kaj alvenis la naŭa, mortis la edzino — jen estis la punkto.

Majstro Johano restis sola kun naŭ infanoj. Hej, multe diras tiu ĉi frazo!

Du aŭ tri el ili jam iradis en lernejon, al unu aŭ du oni devis instrui la iradon, alian porti sur brako, alian manĝigi, al alia kuiri kaĉon; ĉi tiun vesti, tiun lavi kaj por ĉiuj perlabori monon. Certe, karaj baptanoj, tio ne estas facila ofico, bonvolu ja provi!

Se oni devis fari ŝuojn: jen, per unu fojo, naŭ ŝuoj. Se oni devis tranĉi panon: jen, per unu fojo, naŭ tranĉaĵoj. Se oni devis pretigi liton: jen, la tuta ĉambro, de la pordo ĝis la fenestro, estas ununura lito, plena de grandaj kaj malgrandaj kvazaŭhomaj kapetoj.

— Ho, Sinjoro, mia Dio, kiel troe vi benis min, — ĝemis al si multfoje la pia botisto, dum li, eĉ post noktmezo, martelis la plandon, por ke li povu nutri la korpojn de tiel multaj animoj, aŭ dum li ekpuŝis jen unu, jen alian malbone kondutantan dum dormo. Jes ja, ĝi estas naŭ, bela, tuta, ronda 9-cifero. Nu, sed dank' al la bona Dio li ja ne havas kaŭzon por plendi: ĉiuj naŭ estas sendifektaj, bonmoraj, belaj kaj bonaj, benitaj per sana mano kaj piedo kaj stomako; kaj prefere naŭ pecoj da pano ol unu glaso da medikamento, kaj prefere naŭ litoj, ol unu ĉerko inter ili. Dio gardu kontraŭ tio ĉiun senteman patron kaj patrinon, eĉ se restos al li ok, post kiam oni forprenis unu.

Sed la infanoj de majstro Johano havis ja nenian intencon por morti; estis jam destinite, ke ili, ĉiuj naŭ, finlaboros sian vivon cedante al neniu sian lokon; al ili malutilis ja nek la pluvo, nek la neĝo, nek la seka pano.

Iun kristnaskan vesperon majstro Johano venis malfrue hejmen el la granda ĉirkaŭkurado, li portis hejmen pretajn laboraĵojn kaj enspezis malmultan moneton necesan por daŭrigi sian metion kaj por aranĝi la ĉiutagajn bezonojn. Rapidante al sia hejmo, li vidis ĉe ĉiu stratangulo tablojn ŝarĝitajn per oritaj kaj arĝentitaj anĝeloj kaj per sukerpupetoj, kiujn la bonaj vendistinoj vendas por tiuj knaboj, kiuj kondutas bone: ili eĉ demandas pri tio, por ke ili ja ne vendu ion por malbonaj infanoj. Majstro Johano haltis tie kaj ĉi tie, eble li devus aĉeti ion? Sed kiel? Ĉu al ĉiuj naŭ? Tio estus tro multa. Ĉu al

unu? Por ke la ceteraj enviu lin? Ne, li donos al ili alian kristnaskan donacon, kaj belan kaj bonan, kiu nek rompiĝas, nek eluziĝas, kaj pro kiu ĉiuj povos ĝoji, tamen ne povos ĝin preni unu de la alia.

— Nu infanoj: unu, du, tri, kvar: ĉu vi ĉiuj ĉeestas: — li diris veninte en la rondon de sia naŭkapa familio. — Ĉu vi scias, ke hodiaŭ estas kristnaska vespero? Ĝi estas festo. Tre ĝoja festo! Hodiaŭ vespere ni tute ne laboros, sed ni nur ĝojos, ĉiuj.

La infanoj tiel ekĝojis pro tio, ke ili devas ĝoji hodiaŭ, ke ili preskaŭ renversis la domon per sia bruo.

— Atendu ja, kio estus, se mi instruus al vi tiun tre belan kanton, kiun mi scias. Jes, tre belan kanton mi scias, mi konservis ĝin por ĉi tiu tago, kiel kristnaskan donacon.

La etuloj kun granda bruo grimpis-rampis sur la genuojn, al la kolo de sia patro; ili preskaŭ renversis lin por tiu bela kanto.

— Nu! Kion mi diris? Nur se vi bone kondutas. Poste vi devas stariĝi bele, en vico. Jen, tiel! la pli grandaj antaŭen, la pli malgrandaj malantaŭen.

Tiel li starigis ilin, en vico, kiel la orgentubojn. La du plej malgrandaj venis sur la genuojn kaj sur la brakon de la patro.

— Kaj nun silenton! Mi kantos antaŭe, kaj vi kantos poste, post mi.

Kaj nun, kun serioza, pieca mieno, preninte de sia kapo la verdan ĉapon, majstro Johano komencis tiun belan, bonsonan kanton, kiu jene komenciĝas:

»Benata tago de naskiĝ' de Kristo« ...

La pli grandaj geknaboj lernis la melodion jam post la unua aŭdo, pli multan penon bezonis la pli malgrandaj, ili ĉiam forturnis la arion kaj perdis la takton. Sed fine ĉiuj sciis ĝin, kaj jen estis la granda ĝojo, kiam ĉiuj naŭ, per unu fojo, per altaj kaj pli altaj voĉoj eksonigis la belan kanton, kiun la anĝeloj mem kantis je tiu memorinda nokto, kaj kantas eble ankaŭ nun, kiam la harmonia voĉo de tiaj belaj, senkulpaj naŭ animoj petas kun sincera ĝojo la ehon de ili.

Certe ili ĝojas supre en la ĉielo pro la kanto de la infanoj. Sed tiom malpli oni ĝojas pro ĝi supre, en la unua etaĝo.

Riĉa, fraŭla sinjoro loĝas tie, sola en naŭ ĉambroj: en la unua li sidas, en la dua dormas, en la tria pipfumas, en la kvara tagmanĝas: kiu scias, por kio li uzas la ceterajn.

Li havas nek edzinon, nek infanon, sed li havas tiom da mono, ke li mem ne scias, kiom.

Tiu riĉa sinjoro ĝuste sidis tiun vesperon en sia oka ĉambro, kaj pensis pri tio, kial ne havas la manĝaĵo guston, kial estas nenio interesa en la ĵurnaloj, kial ne estas sufiĉe da aero en la grandaj ĉambroj, kial ne estas kvieta dormo en la mola, risorta lito — kiam el la teretaĝa ĉambro de majstro Johano, komence mallaŭte, poste ĉiam pli kaj pli laŭte ekaŭdiĝis al li tiu kanto instiganta por ĝojo.

Komence li ne volis pri ĝi atenti, li pensis, ke ĝi baldaŭ finiĝos, sed kiam ili rekomencis jam la dekan fojon, li ne povis plu toleri la aferon.

Li dispistis inter la fingroj sian estingiĝintan cigaron, kaj iris mem, en dormojako, en la loĝejon de la botisto.

Ili ĵus finis la strofon, kiam li enpaŝis, kaj majstro Johano kun plena estimo stariĝis de sia tripieda seĝo antaŭ la granda sinjoro.

— Vi estas majstro Johano, la botisto, ĉu ne — demandis la riĉa sinjoro.

— Jes, je via servo, sinjoro, ĉu vi ordonas eble lakŝuojn?

— Ne tial mi venis. Kiel multajn infanojn vi havas!

— Jes ja, mi havas, sinjora moŝto, grandajn kaj malgrandajn! Multaj buŝoj, se temas pri manĝado!

— Kaj eĉ pli multaj, se ili kantas. Aŭdu, majstro Johano, mi volas fari vin feliĉa homo. Donu al mi unu el viaj infanoj, mi adoptos, mi edukos lin, li venos al mi por eksterlandaj vojaĝoj, li fariĝos sinjoro kaj povos helpi ankaŭ la aliajn.

Majstro Johano malfermis ege larĝe la okulojn post tiu ĉi diro; ĝi estis granda afero! Sinjoron fari el iu lia infano! Kiun ne surprizus kaj enpensigus ĉi tio!

Ĉu li ne donu? Certe li ja donas, tio ja estas granda feliĉo!

— Nu, rapide elektu unu el ili; poste ni iru.

Majstro Johano komencis la elektadon.

— Jen Aleĉjo! Nu, lin mi ne donas. Li lernas bone, li estos pastro; la dua: ŝi estas knabino, knabinon la sinjora moŝto ne bezonas; Fraĉjo: li jam helpas min en la metio, sen li mi ne povas ekzisti; Johaĉjo: jen, jen, li estas baptita laŭ mia nomo, mi ne povas fordoni lin; la malgranda Joĉjo: li ja estas tute portreto de sia patrino, kvazaŭ ŝin mem mi vidus, ĉu li povus manki en la domo? Nu, jen sekvas ree knabino, do nenio; poste jen estas Paŭĉjo. Ĉi tiu estis plej kara al sia patrino, ho la kompatinda virino turniĝus en la ĉerko, se mi donus lin al fremdulo; nu, kaj ĉi tiuj du lastaj estas tro malgrandaj, kion farus la sinjora moŝto kun ili?

Okazis do, ke li atingis la lastan, tamen li ne povis elekti. Poste li komencis de malsupre al supre, sed la rezulto estis la sama: li ja ne scias kiun fordoni el ili, ĉar ĉiun li amas egale.

— Nu, buboj, elektu mem! Kiu volas foriri, fariĝi sinjoro, veturi en kaleŝo. Parolu do, he! Paŝu antaŭen, kiu volas.

La kompatinda botisto jam preskaŭ ekploris dirante ĉi tion; sed la infanoj dum ĉi tiu instigado tiris sin ĉiuj malantaŭ lian dorson, unu kaptis la manon, alia la piedon, alia la led-antaŭtukon de sia patro, sin alkroĉinte, sin kaŝante de la granda sinjoro.

Fine majstro Johano ne povis plu reteni sin, ĵetis sin inter ilin, ĉirkaŭprenis ĉiujn, kaj komencis larmi sur ilian kapon, kaj tiuj ploris, ploregis kun li.

— Ne eble, sinjora moŝto, ne eble! Petu, volu ĉion en la mondo, sed miajn infanojn al neniu mi povas doni, se la bona Dio ja donis ilin al mi.

La riĉa sinjoro diris, ke tio estas lia afero, sed li faru do por lia plaĉo almenaŭ tiom, ke li ne kantu plu kun siaj infanoj, kaj akceptu de li mil florenojn pro tiu ĉi ofero.

Majstro Johano eĉ diri ne aŭdis ĝis nun la vorton: mil florenoj, kaj nun li sentis, ke ĝi premiĝas en lian manon.

La sinjora moŝto reiris en sian ĉambron por enui, kaj majstro Johano ege miris la nekonatan figuron de la milflorena bankbileto, poste time li fermis ĝin en sia kesto, metis la ŝlosilon en sian poŝon kaj silentis.

Silentis ankaŭ la etularo. Kanti estis malpermesite.

La pli grandaj infanoj malhele sidis sur la seĝoj, silenti-

gante la pli malgrandajn: oni devas ne kanti, la granda sinjoro tion ekaŭdus.

Majstro Johano mem iradis, iradis tien kaj reen en la ĉambro kaj krude li forpelis de si la malgrandan bubeton, la favoraton de sia edzino, kiam li iris al li petante, ke li instruu lin denove pri tiu bela kanto, ĉar li jam forgesis ĝin.

— Kanti estas malpermesite.

Poste grumblante li sidiĝis al laboro, komencis tranĉi fervore la ledon; ĝis tiam li tranĉis kaj tranĉis, ĝis foje, jen li rimarkis, ke ankaŭ li mem komencas kanteti: »Benata tago de naskiĝ' de Kristo.«

Antaŭe li ekfrapis sian buŝon, sed poste li ekkoleris, forpuŝis per piedo de sub si la seĝon, malfermis la keston, elprenis la milflorenan bankbitelon kaj kuris kun ĝi al la unua etaĝo, al la sinjora moŝto.

— Bona sinjora moŝto! Mi petas humile vin, reprenu la monon, por ke ĝi ne estu la mia, por ke mi povu kanti, kiam mi deziras, ĉar tio valoras pli ol mil florenoj.

Kaj li metis la bankbileton sur la tablon kaj kuregis reen al la siaj, kisis ilin laŭvice, starigis ilin laŭvice kiel la orgentubojn, sidiĝis inter ili sur sian malaltan seĝon, kaj ili komencis denove el sincera koro.

»Benata tago de naskiĝ' de Kristo.«

Kaj tiel bonan, bonegan humoron ili havis, kvazaŭ tiu granda domo apartenus al ili.

Kaj tiu, al kiu la granda domo apartenis, iradis sola, en plena soleco tra siaj naŭ ĉambroj kaj meditadis pri tio: kion havas aliaj homoj por ĝoji en ĉi tiu granda, teda mondo.